

Intervjuo kun Walter Zelazny pri Edmond Privat

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-844/331, 1979 decembro 13 kaj 15

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-50->

[/Radioprelego 844 SRI 331 1979 12 13 15 Intervjuo kun Walter Zelazny pri Edmond Privat.mp3](#)

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolas hodiaŭ Claude Gacond kun Walter Zelazny, pola studento kaj ankaŭ art-forĝisto, kiu venis en Svislandon por kontaktiĝi kun, interalie, la penso, la agado de Edmond Privat.

Dum konversacioj, sinjoro Walter Zelazny, vi esprimis intereson pri la penso kaj aktiveco de Edmond Privat kaj ankaŭ de Hector Hodler. Kaj via intenco estas plustudi la dokumentojn, kiuj tiurilate troviĝas en la biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Ĉu vi povas diri, kio estas por vi interesa ĉe Edmond Privat kaj Hector Hodler.

WZ.- Kompreneble estas kelkaj motivoj. La unua, ke ambaŭ estis esperantistoj. La dua ke ambaŭ forte agadis en la sfero de plijustigo de la mondo. Kaj la tria, ke ambaŭ - fakte Hodler mortis frue kaj Edmond Privat poste povis, mi pensas, konservi ankaŭ la penson kaj senton de Hector Hodler – do, Edmond Privat okupiĝis pri Pollando kaj pri Hindio. Do tiuj motivoj por mi estas sufiĉaj por okupiĝi pri tiuj personoj, sed ĉefe pri Edmond Privat.

Cl.- Ĉe la junularo de ĉiuj landoj kaj interalie de via lando, oni admiras pionirojn. Sed tiuj pioniroj estas ĉefe konataj pro sia revolucia agado, verŝajne ĉe vi en okcidento, ĉu ne? Kiuj nomoj estas ekzemple bone konataj tiurilate?

WZ.- Mi pensas, ke ĉe la okcidenta junularo same kiel ĉe la tiel nomata orienta junularo, oni ĉiam direktas sin al la legendaj jam nomoj, kiel ekzemple Ĉe Guevara, Pastro Camillo Torres, ĉu antaŭe Roza Luksemburg. Ĉu ekzemple laste, dek jarojn antaŭ ol hodiaŭ, Daniel Cohn-Bendit, kiu revoluciis en Parizo kaj fakte komencis la tutan rondon de revoluciaj eventoj de junularo antaŭ dek jaroj.

Cl.- Kiujn ĉefajn diferencojn vi faras inter do tiuj revoluciuloj kaj ekzemple Edmond Privat?

WZ.- Estas por vi ĝuste tre interesa afero demandi min respondi, ĉu fakte la modelo de la heroo devas ĉiam porti ion el la perforteco, ion el la revolucio? Kompreneble ni devas scii, ke Ĉe Guevara, Camillo Torres, Luksemburg por ekzemplo agadis en tute aliaj cirkonstancoj ol Edmond Privat, ol Hector Hodler. Tamen ilia sterbo mi pensas, iris aman direkton, plijustigo de la mondo, do kiu diferenco estas? Fakte ni povas diri, ke laŭvorte ekzistas, laŭ mi, neniu diferenco. Laŭ metode ekzistas multaj diferencoj. Ni povas diri ke eĉ antipodaj. Ĉe Guevara, Torres batalis por la plijustigo de Suda Ameriko, kiu fakte ĝis nun estas la kontinento de maljusteco. Ekzemple Hodler kaj Privat agadis pri plijustigo de jam iusence justa mondo. Sed ĉu ilia agado estas malpli signifa per tio, mi dubas. Mi pensas, ke ili ankaŭ povas esti herooj de junularo.

Cl.- Edmon Privat estas intime ligita al la descendo de la pola sendependiĝo. Ĉu lia agado restas konata nun en Pollando?

WZ.- Oni povas diri ke ĉe multaj intelektuloj, ĉefe, kiuj interesiĝas pri la Pollando, kiu praktike ne ekzistis dum 150 jaroj, ĉar estis dispartigita de prusoj, rusoj kaj aŭstroj, oni povas diri ke en la medio de ĉi tiuj intelektuloj la agado de Edmond Privat estas konata. Tamen mi

pensas, ke Edmond Privat meritas pli grandan studon kaj pli grandan konaton en Pollando. Do mi respondas ankaŭ aldone pri mia motivo. Fakte li devas esti pli agnoskita en Pollando. En La Chaux-de-Fonds mi trovis muzeon de Edmond Privat. En ĝi estas multaj dokumentoj en la pola lingvo, kiuj restas ĝis nun ni diru netuŝitaj. Mi volas pristudi tiujn dokumentojn, ordigi ilin kaj fari eble iun tezon pri la vivo de Edmond Privat. Kaj tion mi povas fari nur dank' al mia scio de esperanto. Alimaniere la afero estus neimagebla por mi.

Cl.- Ankaŭ eble la scio de la franca estus necesa, kion vi opinias?

WZ.- Jes, pli kaj pli mi kaptas la francan kaj nun mi bezonas resti en la franca teritorio por perfektigi la lingvon. La franca fakte estas necesa.

Cl.- Edmond Privat do multfoje iris en Pollandon, interalie li iris ĉe la familion Zamenhof, sed ankaŭ li ne nur laboris por la pola sendependiĝo, sed por la hinda sendependiĝo, ekzemple. Do, ĉu vi konas tiun lukton por la sendependiĝo de Hindio kaj ĉu vi vidas paralelojn, paralelaĵojn inter pola sendependiĝo kaj hinda sendependiĝo ĉe la agado de Privat?

WZ.- Jes, Privat estis tiu homo, kiu fakte ĉie troviĝis, kie bezonata estis la protektado de iu nobla ideo. Privat pro la pola agado estis eĉ moke nomita 'Privatovski' ĉar neniue kredis, ke la Pollanda vivo povas esti sendependa. Kaj fakte Pollando post 1911 jaro gajnis la sendependecon. Se temas pri Hindio, kompreneble estas tute alia afero. Tamen estas unu paralelo, ke same kiel poloj, hindoj bezonis iun grandan protektadon internaciskale. Pollando kaj Hindio estis okcidente nekonataj. Tio kion faris Privat estis ke li konatigis multajn homojn kun problemoj polaj kaj Hindiaj. La fruktoj de ambaŭ agadoj: Pollando ricevis sendependiĝon. Frukto de Hindia agado: la defenda rezista movado, ni povas diri ke ankaŭ ĉi tiu movado, ĝuste kiu iris el sento de Edmond Privat ricevis iun danĝerecon. Tiu agado, kiun ni nomas agado de noblulo riĉa en blankaj manumoj ankaŭ fruktis per grava morto, nome D-ro Luther King, usonano, negro, mortis pro la ideoj, kiuj iris el la politika vidpunkto de Nehru, Gandhi, Edmond Privat. Ni povas diri ke ĉi tiu penso trovas la lokon en nuna politika vivo kaj mi supozas, ke ĉi tiu penso pli kaj pli venkos.

Cl.- Sinjoro Walter Zelazny, en la kadro de Pola Studenta Esperanto-Komitato vi organizas regule seminariojn interlingvistikajn. Pollando kaj Edmond Privat estas ligitaj. Ĉu vi opinias, ke foje unu seminario povus ĝuste pritrakti la luktagadon neperfortan, kiun defendis Edmond Privat?

WZ.- Jes, mi pensas pri tio kaj mi povas diri ke post unu jaro ni organizos, eble kadre de nia kultura agado, la seminarion pri Edmond Privat. Sed ĝi havos tri aspektojn. La unua: vivo de Edmond Privat, la dua: vivo de Edmond Privat kiel esperantisto, la tria: vivo de Edmond Privat kiel defendanto de minoritataj fortoj. Ni diru, kiel minoritataj tendencoj al la plijustigo de la mondo. Mi certas ke ĉi tiu seminario okazos, samtempe mi certas, ke pola junularo, studentaro, almenaŭ esperanta parto okupiĝos pri la vivo de Edmond Privat.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond intervjuis Walter Zelazny. Ĝis reaŭdo!